

La Bahaa Kredo : kuracilo kontraŭ malamo kaj fanatikeco religiaj

verkita de la D-ro. *Éric COFFINET* (Erik Kofine) en 2017
okaze de la ducentjariĝo de la naskiĝo de Bahá'u'lláh.

"Vi estu persistaj pri la religio kaj ne disiĝu pri ĝi" (La Nobla Korano > K:42/14)

Neniu plu povas ignori terurajn agojn, kiujn plenumas iuj je la nomo de sia religio kaj sekve de sia legado de siaj sanktaj skriboj. Tiaj agoj malkonformas al sentoj kaj opinioj de modernaj homoj, sed oni ne sukcesas refuti ilian kaŭzon : religia radikalismo.

Kelkaj erudiciuloj religiaj sukcesis tromplogi junulojn malklerajn kaj malkontentajn per logproponoj entuziasmigaj, kun promeso de gloro kaj riĉaĵoj en ĉi-tiu mondo kaj de paradizo en la transmondo.

Ili instruas, ke la unusola religio akceptita de Allaho (la Dio) estas islamo (K:3/20, 86), kiun instruis ankaŭ Moseo kaj Jesuo. Iliaj disĉiploj estis do islamanoj (K:10/85, K:3/53). Sed kiel tio estas ebla, ĉar ili neniam konis Mohamedon, nek lian Libron, nek lian Leĝon ?!

Por tion kompreni necesas scii la originon de la vortoj "islamo" kaj "islamanoj". Ili estas esperantigo de arabaj vortoj devenantaj de la trilitera radikulo SLM, kiel la verbo aSLaMa (submetiĝi), kaj la nomoj iSLaM (submetiĝo), muSLiM (submetiĝinto / pluralo : muSLiMin), SaLaM (paco). Do "islam" signifas en la araba lingvo, ke ĝi estas religio de paco per submetiĝo al la Dia volo.

Oni povas legi en la Korano, ke Dio sendis profeton al ĉiu homa komunumo por instrui islamon (K:16/37) kaj estigi religian kulton (K:22/68). Tiel, laŭ la Korano, Moseo kaj Jesuo instruis la religion de la "submetiĝo al Dio" (islam-on). Ili mem kaj iliaj disĉiploj estis "submetiĝintaj al Dio" (islam-anoj). Fariĝas klare, ke esti islamano estas ne tute la sama afero ol esti mohamedano : "submetiĝi al Dio" estas mensostato, dum israelidoj, kristanoj aŭ mohamedanoj estas membroj de diversaj komunumoj historiaj en la sama religio de la "submetiĝo al Dio". Oni raportas, ke Mahomedo diris : *"ĉiu bebo naskiĝas submetiĝinta al Dio, kaj poste iliaj gepatroj faras el ĝi idolanon, israelidon aŭ kristanon"*... kaj mi aldonas : mohamedanon !

La versio fondita de Mohamedo evoluis dum jarcentoj surbaze de la Korano kaj de la Sunao (kompilaĵo de raportitaj eldiroj kaj agoj de Mohamedo) kaj ĝi estigis gravan skismon kaj diversajn skolojn. Unu el ili titoliĝas la religio de la "prauloj" (salaf), kiu estas la plej konservema, la plej rigora kaj la plej rigida formo de Sunaismo.

Laŭ la membroj de tiu skolo, la Korano estas transskribo de la Paroloj de Dio, transdonitaj de la anĝelo Gabrielo al Mohamedo (K:2/98). Ili kredas, ke ĝi estas nekreita, eterna, universala, senerara, perfekta, kompleta (K:16/90), kaj protektita de Dio mem kontraŭ iu ajn difekto aŭ eraro (K:15/10). Ne eblas samtempe akcepti parton de ĝi kaj forlasi alian (K:2/86) : se la mesaĝo estas senduba, ĝi estas plenumenda, kaj se ĝi estas dubasenca, ĝi estas kredenda sen provi interpretadon (K:3/8). Laŭ la Korano, Mohamedo estas la "Belega Ekzemplo" imitinda (K:33/22, K:68/5) kaj obeenda (K:4/60). Li estas "marŝanta Korano" laŭ la eldiroj de sia edzino Ajŝa'.

Dum pluraj jaroj mi debatis kun mohamedanoj en la Tut-Tera-Teksaĵo kaj konstante demandis ilin pri **"kiu legitime rajtas malpermesi tion, kion permesas la Korano aŭ la Sunao ?"**

Kiel ekzemple : la "sankta" milito (K:9/5, 29, 111) kun konsekvencoj de rabakiro (K:8/42), de sklavigo de venkitoj, kaj de humiliga tributo (ĝiziah) pagenda de israelidoj kaj de kristanoj por "protekti" siajn posedaĵojn, honoron kaj vivon kontraŭ mohamedanoj (K:9/29); edziĝo kun pluraj virinoj samtempe (K:4/4) kaj eĉ kun knabinoj (K:33/50, K:65/5); diskriminacio laŭ sekso aŭ kredo aŭ socia statuso (K:2/222, K:4/26, K:5/6); la leĝo de "egala repago" (K:2/179, K:5/46) kaj la punoj preskribitaj en la Korano kaj la Surao (skurĝi, ŝtonumi, krucumi, fortanĉi manon kaj piedon, mortpuni) (K:5/34, K:24/3); "legitima" trompo (takija), malamikeco kaj eĉ malamo kontraŭ tiuj rigardataj kiel miskredantaj aŭ malpuraj (K:3/29, K:5/52, K:6/146, K:9/23 kaj 28, K:60/5) ...

Silenti estis ilia kutima respondo, kaj mi ordigas la aliajn respondojn laŭ kvar tipoj, de la pli al la malpli oftaj :

Unua respondo : nur Dio kaj Liaj senditoj povas legitime agi tiel. Sekve eĉ la plej malgranda provo de kontesto estos konsiderata kiel netolerebla atenco kontraŭ islamo.

Dua respondo : la Kalifo rajtas PORTEMPE nuligi leĝon pro neceso aŭ justeco. Tiel agis la tria Kalifo Omaro, kiu malpersesis fortranĉi la manon al ŝtelistoj dum malsatego. S-ro Tarik Ramadan simile proponis moratorion pri ŝtonumado de geadultuloj, sed ne plu estas legitima Kalifo de post 1924 ...

Tria respondo : S-ro Tarek Oŭbroŭ proponis koncepton de "ŝario de minoritatoj" por mohamedanoj vivantaj ekster la islamaj landoj. Li konsilas al ili obei leĝojn de la lando, en kiu ili vivas, nur se temas pri nekultaj aferoj. Li tiel sekvas la ekzemplon de Mahomedo, kiu estis "modera", kiam li ne estis sufiĉe forta. Tio ŝajnas laikeca ... sed ĉu tio daŭros, se mohamedanoj fariĝos la plej nombraj aŭ la plej fortaj ?

Kvara respondo : kelkaj leĝoj ne plu taŭgas por nia epoko kaj ili estas forlasendaj. S-ro Mahmud Mohamed Taha instruis, ke la Korano enhavas duoblan mesaĝon : la unua de Mekko estas spirita kaj neŝanĝebla, dum la dua de Medino estas politika kaj ŝanĝebla. Pro tio li estis ĝismorte pendumita en Sudano ...

Oni povas kontraŭstari tiun jam menciitan version de islamo per saĝo, leĝo kaj forto, sed kiel superi la transcendan aŭtoritaton, kiu animas ĝin ? Kiel agi por ke la mohamedanoj forlasu siajn ne plu taŭgajn kutimojn praajn sen sento de malfideleco al sia religio ?

"Malamo kaj fanatikeco religiaj estas konsumata fajro, kies furiozon neniu povas estingi. Nur la mano de la dia potenco povas liberigi la homaron de tiu plago." (Selektitaj fragmentoj el la skriboj de Bahá'u'lláh : 132a ĉapitro)

Bahá'u'lláh (1817-1892) estas la fondinto de la Bahaa Kredo, kiu estas la plej nova el la abrahamidaj religioj. Li ekkonsciis pri sia profeta misio en subtera karcero de Teherano dum 1852. Oni poste ekzilis lin tra la Mez-Oriento, de Teherano al sinsekve Bagdado (1853-1863), Konstantinopolo (1863), Andrianopolo (1863-1868), kaj fine al Akko en la Sankta Lando ĝis lia morto (1868-1892).

Dum la kvardek jaroj de sia nevola ekzilo, li senĉese skribis al ĉiuj tiamaj regantoj religiaj kaj politikaj por anonci sian mesaĝon : li asertas, ke li estas la "Reveno de la Mesio" atendata de la kristanoj kaj de mohamedanoj, kaj ke li estas sendita por gvidi la homaron dum tempoj de ĝisfunda ŝanĝiĝo de la mondordo, anoncitaj en la Sanktaj Libro kiel la "Tago de la Releviĝo kaj de la Juĝo" (jaŭm al-kijamah). Kiel Johano la Baptisto estis la heroldo de Jesuo, tiel por Bahá'u'lláh rolis Báb (1819-1850), kiu deklaris esti la Mahdi-o anoncita de Mohamedo je la "fino de la tempoj".

La Korano enhavas versojn sendubajn, kiuj estas ĝia bazo, kaj versojn dubasensajn, kies klarigo dependas nur de Dio (K:3/8, K:75/17-20). La Bajano (klarigo) estas ĉefverko de Báb, kiun kompletigas la Libro de Certeco (ketab-e-ikan) verkita de Bahá'u'lláh. Laŭ ili tiuj libroj estas dia Revelacio, kiu klarigas simbolojn kaj metaforojn uzitajn en la Biblio kaj la Korano, kaj kiuj havigas novan komprenon pri eskatologio monoteisma.

Bahá'u'lláh korektas kelkajn misinterpretojn de erudiciuloj mohamedanaj, kiel ekzemple pri la krucumado de Jesuo, pri la ĉeso de la revelacia procezo post la morto de Mohamedo, aŭ pri literala legado de tio skribita en la Biblio kaj la Korano pri la "fino de la tempoj". Li instruas, ke la "Tago de la Releviĝo kaj de la Juĝo" ne temas pri fizika detruo de nia universo kaj fizika rekonstruo de nova mondo heredota de la "justaj servantoj" (K:10/5, K:21/105-106), sed transiro inter du cikloj de la disvolviĝo de la homaro. La malnovan ciklon inaŭguris Adamo, kiu estas ne la unua homo sed la plej malnova profeto de tiu etapo, kaj fermis Mohamedo, kiu estas titolita la "Sigelo de la Profetoj" (ĥatem an-nabijin) (K:33/41). Dum tiu ciklo, la homaro travivis sian infanaĝon. La novan ciklon inaŭguras Bahá'u'lláh kaj daŭrigos multaj sendotoj de Dio. Dum tiu ciklo la homaro plene maturiĝos kaj la homa civilizacio atingos sian kulminon. Fama hadiso (raporto pri agoj aŭ eldiroj de Mohamedo) asertas, ke Mohamedo estas kvazaŭ la "lasta briko" aldonita por finkonstrui domon perfektan. Sed Dio povas starigi novan konstruaĵon apud la malnova, kaj eĉ kompletan urbon, ĉar Lia Revelacio estas neelĉerpebla ! (K:31/28-29)

Por bone ekkonscii kiom ŝanĝiĝis nia mondo depost du jarcentoj, provu imagi tion ĉirkaŭ ni, kio ne ekzistis en la tempo de Mohamedo !

En siaj skriboj Bahá'u'lláh konfirmas la absolutan transcendecon kaj ununurecon de Dio. Li asertas komunan originon dian de la religioj kaj li klarigas, ke ili enhavas duoblan mesaĝon : spirita parto neŝanĝebla kaj socia parto ŝanĝebla laŭ tempoj kaj lokoj. Li donas al la kultaj fundamentoj (religia kredo, preĝado, fastado, almozdono, pilgrimado) novajn formojn taŭgajn por nia moderna mondo. Li formulas konsilojn por regi la homajn sociojn sed lasas iliajn regadon inter la manoj de legitimaj aŭtoritatoj laikaj. Li instigas siajn disĉiplojn por ke ili estu lojalaj al sia registaro, observu leĝojn de sia lando, ne kaŭzu tumultojn kaj ne aliĝu al politikaj partioj. Por la unua fojo en la religia historio de la homaro, Bahá'u'lláh klare kaj sendube indikas la naturon kaj la rolojn de la bahaaj komunestroj post sia morto.

Bahá'u'lláh validas do la kvar malsamajn tipojn de respondoj al la demando pri "kiu legitime rajtas malpermesi tion, kion permesas la Korano aŭ la Sunao". Per transcenda aŭtoritato profeta li klarigas la Sanktajn Skribojn kaj decidas kiel apliki ilin ĉu laŭ la spirito ĉu laŭ la litero. Li testamente rajtigas estrojn de la Bahaa Komunumo por decidi kie, kiam kaj kiel la bahaaj leĝoj estos aplikataj. Li aprobas apartigon de la potencoj religiaj kaj politikaj (t.e. laikeco). Li ankaŭ aprobas la koncepton de la duobla mesaĝo spirita kaj socia de la religioj.

Kiel rilatas la vivo de Bahá'u'lláh kun la tradiciaj rakontoj pri la Reveno de Jesuo filo de Maria, kiu estas priskribita en la Korano kiel Sendito (rasul'o'llah), Parolo (kalimat'o'llah) kaj Spirito (ruh'o'llah) de Dio (K:4/172) ? La imamo Ĝalaloddin as-Sojuti (1445-1505) verkis libron pri la Reveno de Jesuo je la fino de la tempoj laŭ la tradicio mohamedana. En ĝi oni povas legi ke :

- * La Mahdi-o aperos antaŭ la Mesio kaj restarigos justecon sur la tero.
- * La Mesio revenos poste el la Ĉielo, preĝos malantaŭ la Mahdi-o kaj aprobos liajn decidojn.
- * Li ricevos Revelacion de Dio (ŭahi) kaj estos "signo de la Horo" (K:43/62).
- * Li aperos en la granda Sirio (bilad aŝ-Ŝam) kaj venkos la Antikriston (al daĝal) en la Sankta Lando.
- * Li certigos la finvenkon de islamo, gvidos la komunumon, mortigos la porkon, rompos la krucon, ĉesigos la humiligan tributon (ĝiziah) kaj almozon.
- * Li edziĝos, generos infanon, vivos sur la tero dum kvardek jaroj kaj fine mortos.

En 1844 Báb deklaris, ke li estas la Mahdi-o anoncita de Mohamedo. Bahá'u'lláh fariĝis lia disĉiplo kaj unu el la estroj de la Baba komunumo. Post la martirigo de Báb per pafado en 1850, Bahá'u'lláh suferis pro persekutado kaj maliberigo en subtera karcero de Teherano. Tie li havis en 1852 mistikan sperton, kiu ekkonsciigis lin pri lia profeta misio. Li estis poste ekzilita al Bagdado, kie li publike anoncis sian mision en 1863. Fine de siaj sinsekvaj ekziloj li alvenis en la Sanktan Landon, kie li venkis la religian ribelon instigitan de lia duon-frato. Lia misia vivo daŭris kvardek jarojn (1852-1892) kaj lia unuenaskita filo 'Abdu'l-Bahá heredis la komunestrecon post lia morto.

Kion instruas Bahá'u'lláh, tio vere estas nur la eterna religio de la "submetiĝo al la Dia volo" laŭ formo taŭga por nia aktuala mondo. Bahá'u'lláh malpermesas la "sanktan" militon (ĝihad bis sajf), abolas la ritan malpurecon (naĝes) kaj ĉesigas leĝajn punojn (hodud), ĉar ili ne plu konformas laŭ li al la nuntempa stato de la homa socio. Malpersante la "sanktan" militon, li konsekvence nuligas la tributon (ĝiziah) (K:9/29); abolante la ritan malpurecon, li "mortigas la porkon", kiu simbolas ĝin (K:6/146); ĉesigante punojn preskribitajn en la Korano kaj la Surao (hodud), li "rompas la krucon", kiu estas ekzemplo de tiaj punoj (K:5/34). Li malpermesas almozpeti kaj almozdoni, kaj li honoras laboron kiel adoragon.

La alvokoj de Baha'u'llah al religiestroj, por ke ili reformu la "eternan islamon" laŭ maniero taŭga por nia epoko, instigas nin al pripensado kaj agado por fariĝi la "justaj servantoj", kiuj heredos la Teron (K:21/105-106), kaj fariĝi la *"administrantoj de nova interligo, ne laŭ litero, sed laŭ spirito; ĉar la litero mortigas, sed la spirito vivigas"* (2 Korintanoj : 3/6). Lia interpretado de la Sanktaj Skriboj kun profeta aŭtoritato, renovigas eskatologion, rompas riglilon de religia tradicio kaj liberigas el katenoj de malamo kaj fanatikeco.

Kio estas laŭ Bahá'u'lláh la fundamenta celo de la religioj ? Jen kion li skribis pri tio :

"La Granda Estaĵo diras : O vi homidoj ! La fundamenta celo de la Fido de Dio kaj de Lia Religio estas protekti la komunan bonon de la homaro, starigi ĝian unuecon kaj disvolvi senton de amo kaj frateco inter la homoj. Ne permesu, ke ili fariĝu inter vi fonto de malpaco kaj malkonkordo, de malamo kaj malamikeco. Tiel estas la rekta Vojo, kiun vi devas sekvi, la nemovebla fundamento, sur kiu vi devas konstrui. Ĉio, kion vi starigos sur tiu bazo, neniam estos malfortigita de ŝancoj kaj sortoŝanĝoj de ĉi-tiu mondo, nek strukture difektita dum sennombraj jarcentoj. Nia espero estas, ke la religiestroj de la mondo kaj ĉiuj ĝiaj regantoj unuiĝos por strebi al reformado de ĉi-tiu epoko kaj al la relevo

de ĝiaj destinoj; post diligenta studado pri la bezonoj de la mondo, ili interkonsiliĝu kaj zorge decidu apliki al tiu mondo malsana kaj kruele afliktata la kuracilon, kiun postulas ĝia stato... Devige estas al ĉiuj regantoj resti moderaj en ĉio. Kio ajn estas ekster la limoj de modereco, tio ĉesas boninflui." (Selektitaj fragmentoj el la Skriboj de Bahá'u'lláh : 110a ĉapitro)

"La celo de la unusola vera Dio (ekzaltata estu Lia gloro !), kiam Li rivelas Sin al la homoj, estas aperigi la gemojn kaŝitajn en la minejo de ilia intima kaj esenca esto. La esenco de la Fido de Dio kaj de Lia Religio estas en tiu Tago, ke la diversaj sistemoj kaj kredoj religiaj neniel fariĝu kaŭzo de malkonkordo inter la homoj. Tiuj principoj kaj leĝoj, tiuj potencaj kaj firme starigitaj sistemoj religiaj, devenas de la sama Fonto kaj estas la radioj de la sama Lumo. La fakto, ke ili malsimilas unu de la aliaj, rezultas nur de la diversaj bezonoj de la epokoj, dum kiuj ili estis promulgataj (...) Malamo kaj fanatikeco religiaj estas konsumata fajro, kies furiozon neniu povas estingi. Nur la mano de la dia potenco povas liberigi la homaron de tiu plago. La Parolo de Dio estas lampo, kies lumo estas tiuj vortoj : vi estas la fruktoj de la sama arbo, la folioj de la sama branĉo. Ja rilatu unu kun la aliaj plej ame kaj harmonie, amikece kaj fratece." (Selektitaj fragmentoj el la Skriboj de Bahá'u'lláh : ĉapitro 132a)

Kaj kion signifas laŭ Bahá'u'lláh la "asistadon al Dio" kaj la "strebado laŭ la vojo de Dio" (ĝihad fi sabil Allah) ? Jen kion li skribis en letero al la Ŝaho de Persio Naser-ed-din :

"Li estas Dio, Ekzaltata estu Lia gloro.

"Estas klare kaj evidente, ke la unusola vera Dio – glorata estu Lia mencio ! - estas sanktigita super la mondo kaj ĉio en ĝi. "Asistado al Dio" ne signifas, ke iu ajn animo devus kontraŭstari aŭ batali kontraŭ alia. La suverena Sinjoro, kiu laŭplaĉe agas, konfidis la regadon de la regno de la kreitaĵaro, de ĝiaj landoj kaj de ĝiaj maroj, al la manoj de la reĝoj, ĉar ili estas la manifestiĝo de Lia dia potenco, ĉiu laŭ sia grado. Se ili sin ŝirmas sub la ombro de la Verulo, ili estos enkalkulitaj kiel partianoj de Dio; kaj se ne, via Sinjoro vere scias kaj rimarkas ĉion.

Kion Dio – glorata estu Lia nomo – deziras por Si, tio estas la koroj de Liaj servantoj, kiuj estas la trezoroj de Lia amo kaj de Lia memoro, same kiel la deponoj de Lia scio kaj de Lia saĝo. La ĉiama deziro de la eterna Reĝo estas purigi la korojn de Liaj servantoj je la mondanaĵoj kaj ĉio rilatanta, por ke ili fariĝu indaj ricevi la splendoron de Tiu, kiu estas la Reĝo de ĉiuj nomoj kaj de ĉiuj atributoj. Tial, neniu fremdulo estu akceptita en la urbo de la koro, por ke la nekomparebla Amiko eniru Sian hejmon. Per tio oni signifas la splendoron de Liaj nomoj kaj de Liaj atributoj, sed ne Lian esencon ekzaltitan ĉar tiu nekomparebla Reĝo ĉiam estis kaj porĉiam estos sanktigita super supreniro kaj malsupreniro.

Sekve la esprimo "asistado al Dio", en la nuna tago, ne signifas kaj neniam signifos kontraŭstari aŭ kvereli kontraŭ iu ajn animo. For de tio ! Preferinde estas je la okuloj de Dio, ke la urboj de la homa koro, kiujn regas la armeoj de egoismo kaj pasio, estu subigitaj per la spado de parolo, de saĝo kaj de kompreno. Tiel, kiu ajn strebas asisti Dion, tiu devas antaŭ ĉio konkeri per la spado de klarigo kaj spirita senco la urbon de sia koro, gardi ĝin kontraŭ rememoro pri ĉio escepte Dio, kaj nur poste impeti al subigado de la urboj de la koro de aliuloj.

Ja tio estas la vera senco de la esprimo "asistado al Dio". Ribelo neniam plaĉis al Dio, nek Li konsentis agojn plenumitajn de certaj stultuloj en la pasinteco. Sciu, ke esti

mortigita je la vojo de Lia bonplaĉo estas pli bone al vi ol mortigi. En tiu tago, la amatoj de la Sinjoro devas kondukti inter Liaj servantoj tiel, ke iliaj agoj gvidos ĉiujn homojn al la paradizo de la Plejglora.

Je la nomo de Tiu, kiu brilas super la Oriento de Sankteco ! La amikoj de Dio siajn esperojn ne ligas kaj neniam ligos al la mondo kaj al ties efemeraj posedaĵoj. La unusola vera Dio ĉiam konsideris, ke la homaj koroj ekskluzive apartenas al Li. Tio estas ankaŭ esprimo de Lia mizerikordo, kiu superas ĉion, por ke la mortemaj animoj estu sanktigataj kaj purigitaj je ĉio apartenanta al la mondo de polvo, kaj eniru la regnojn de eterneco. Cetere tiu ideala Reĝo, en Si kaj per Si, sufiĉas al Si kaj estas sendependa de ĉio. Nek la amo de Liaj kreitaĵoj povas profiti al Li, nek iliaj malbonagoj povas malutili al Li. Ĉiuj devenas de polvo kaj revenos al polvo, dum la vera Dio, sola kaj ununura, estas starigita sur Sia trono, trono situanta ekster tempo kaj spaco, sanktigita super iuj ajn parolo aŭ esprimo, aludo, priskribo kaj difino, ekzaltita trans ĉiuj nocioj pri malaltigo kaj glorigo. Tion neniu scias krom Li kaj tiuj kun la kono de la Libro. Ne estas alia Dio krom Li, la Ĉiopova, la Plejmalavara." (citaĵo el Suriĵe-Hajkal, legebla en la paragrafoj 210-214 de la libro titolita la "Alvoko de la Sinjoro de la armeoj".)

BIBLIOGRAFIO :

1) Selektitaj fragmentoj el la Skriboj de Bahá'u'lláh, legeblaj interrete en la lingvoj angla (<http://www.bahai.org/library/authoritative-texts/bahauallah/gleanings-writings-bahauallah/>) kaj franca (<http://www.religare.org/livre/bahai/ba-bah-florilege.php>).

2) "Alvoko de la Sinjoro de armeoj" estas kompilaĵo de leteroj de Bahá'u'lláh al tiamaj regantoj religiaj kaj politikaj. La libro estas legebla interrete en la lingvo angla (<http://www.bahai.org/library/authoritative-texts/bahauallah/summons-lord-hosts/>) kaj en la lingvo franca (<http://www.religare.org/livre/bahai/ba-bah-appel.php>).

3) "le Retour de Jésus à la Fin des Temps selon la Tradition musulmane" (la Reveno de Jesuo, je la fino de la tempoj laŭ la islama tradicio), verkita arabe de la imamo *Jaláuddîn as-Suyûtî*, tradukita al la franca lingvo de *Mohamed Aoun*, kaj eldonita de IQRA en Parizo je 2000 (ISBN:2-911509-34-X).

4) La Nobla Korano, tradukita el la araba lingvo de Prof D-ro *Italo Chiussi*, eldonita de TK* en Kopenhago je 1970, N° 10 de la Serio "Oriento-Okcidento" sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Pri la koranaj referencoj indikitaj en la teksto : K simbolas la Koranon, la unua nombro indikas la ĉapitron (suraŭ) kaj la aliaj la versojn.

CITITAJ VERSOJ DE LA NOBLA KORANO :

K:2/86 : (...) Ĉu vi kredas nur al unu parto de la Libro kaj nekredas al la alia ? Ne estos rekompenco por tiuj el vi, kiuj nenion plenumas krom hontindaĵoj en ĉi tiu vivo, kaj en la tago de la revivigo ili estos senditaj al plej grava turmento. Allah ne ignoras, kion vi faras.

K:2/98 : Diru : "Kiu estas malamiko de Gabrielo – vere li mem sendis tion en viajn korojn laŭ la permeso de Allah kiel plenumiĝon de tio, kio jam estis ĉe Li kaj kiel gvidilon kaj kiel bonan novaĵon por le justuloj - "

K:2/179 : Ho vi kredantoj, al vi estas ordonite repagi murdon laŭrajte : liberulon pro liberulo, sklavon pro sklavo, virinon pro virino; tamen se indulgo estos konsentita al iu ajn

fare de lia frato, tiam la persekuto estu farita juste kaj la kulpulo pagu al li la murdropagon volonte (...)

K:2/222 : Ne edziĝu al idolaninoj, antaŭ ol ili fariĝos kredantinoj. Eĉ kredanta sklavino estas pli bona ol idolanino, eĉ se tiu tre plaĉas al vi. Kaj ne edzinigu kredantinojn al idolanoj, antaŭ ol ili fariĝos kredantoj. Vere eĉ kredanta sklavo estas pli bona ol idolano, eĉ se tiu tre plaĉas ai vi. (...)

K:3/8 : Estas Li Tiu, kiu sendis al vi la Libron, en kiu estas versoj nemiskompreneblaj – tiuj estas la bazo de la Libro – kaj aliaj, kiuj estas alegoriaj. Tiuj homoj, en kies koroj estas pekemo, prenas tiujn versojn, kiuj estas alegoriaj, pro sia emo al disigo kaj interpretado. Neniu tamen scias ilian interpretadon krom Allah kaj krom la firmuloj en la scio, kiuj diras : "Ni kredas je ĝi; ĉio venas de nia Sinjoro". Tion tamen pripensas nur la prudentuloj.

K:3/20 : Vere, la sola religio antaŭ Allah estas la Islamo (...)

K:3/29 : La kredantoj ne prenu miskredantojn kiel amikojn prefere ol aliajn kredantojn. Kiu tion faras, ne estas amiko de Allah, escepte se vi estas singardemaj kontraŭ ili. Allah mem protektas vin kaj al Allah estos la reveno.

K:3/53 : Kiam Jesuo perceptis ilian nekredon, li diris : "Kiu volas esti mia helpanto ĉe Allah ?". La disĉiploj respondis : "Ni estos viaj helpantoj ĉe Allah, ni kredas je Allah, kaj vi atestu, ke ni estas submetiĝintaj."

K:3/86 : Kiu serĉas alian kredon ol la Islamon, sciu : neniam ĝi estos akceptita de li, kaj en la tago de la Juĝo li estos unu el la perdantoj.

K:4/4 : Se vi timas, ke vi ne kapablas agi juste kontraŭ la orfoj, tiam edziĝu al virinoj, kiuj plaĉas al vi, du aŭ tri aŭ kvar; se vi tamen timas, ke vi ne kapablos agi juste, tiam nur unu aŭ nur tiun, kiun posedas via dekstra [sklavistino]. Tiel vi povos eviti la maljustecon.

K:4/26 : Kiu el vi ne posedos sufiĉe da proprajoj por edziĝi al liberaj kredantinoj, tiu edziĝu al tiuj, kiuj posedas lia mano dekstra, nome al kredantaj sklavinoj. Allah konas vian kredon. Ĉiu el vi estas de la alia, do edziĝu al ili se ilia gento permesas, kaj donu al ili doton laŭ justeco, se ili estas ĉastaj, ne adultas kaj ne havas amantojn kaŝe. Se tamen ili plenumos hontindaĵon, post kiam ili edziniĝis, tiam ili ricevu la duon de la puno, kiu estas ordonita por libera virino. Tio validas por tiu el vi, kiu timas punon. Se vi tamen estos sindetemaj, estos eĉ pli bone por vi. Allah estas senkulpigema, pardonema.

K:4/60 : Ho vi, kredantoj, obeu Allahon kaj obeu Lian senditon kaj tiujn el vi, kiuj posedas la regadon; kaj kiam vi malkonsentas pri io, proponu ĝin al Allah kaj al la sendito, se vi kredas je Allah kaj al la vivo venonta. Tio estos la plej bona kaj la plej konvena solvo.

K:4/172 : Ho vi, popolo de la Skribo ! Ne troigu je via religio, sed diru pri Allah nur la veron. Vere la Mesio Jesuo, filo de Maria, estis sendito de Allah [rasul'o'llah] kaj bona novaĵo de Li [kalimat'o'llah], kiun Li sendis al Maria, kaj graco de Li [ruh'o'llah], do kredo je Allah kaj al Liaj senditoj kaj ne diru : "Tri". Forlasu do, estos pli bone por vi. Vere Allah estas Dio ununura. Malkonvenas al Lia sankteco havi filon. Al Li apartenas ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Allah sufiĉas kiel defendanto.

K:5/6 : Hodiaŭ estas permesita al vi ĉio bona; kaj la manĝaĵoj de tiuj, al kiuj estis donita la Skribo, estas permesitaj al vi, kaj viaj manĝaĵoj estas permesitaj al ili. Permesitaj al vi estas

ĉastaj kredantinoj kaj ĉastaj virinoj el tiuj, al kiuj la Skribo estis donita antaŭ al vi, se vi donos al ili doton, en vera geedziĝo, ne adulte nek prenante konkubinon. Kiu rifuzos la kredon, vere ties verko estos neniigita kaj li estos unu el la perdantoj en la vivo venonta.

K:5/34 : Vere la repago por tiuj, kiuj militas kontraŭ Allah kaj Lia sendito kaj provas krei malpacon sur la tero, estu, ke ili estu mortigitaj aŭ krucumitaj, aŭ ke al ili estu fortranĉitaj manoj kaj piedoj pro ilia malobeo, aŭ ke ili estu forpelitaj el la lando. Tio estas honto en ĉi tiu vivo; kaj por ili estos grava puno en la vivo venonta.

K:5/46 : Ni dekretis en ĝi [la Torao] : vivon pro vivo, okulon pro okulo, nazon pro nazo, orelon pro orelo, denton pro dento, justan repagon pro vundo. Kiu tamen forlasos, por li tio estos elpago de liaj pekoj. Tiuj, kiuj ne juĝas laŭ tio, kion Allah sendis, estas pekuloj.

K:5/52 : Ho vi, kredantoj ! Ne prenu Judojn aŭ Kristanojn kiel amikojn. Ili estas amikoj unu de la aliaj. Kiu el vi prenos ilin kiel amikojn, vere li estos unu el ili. Vere Allah ne gvidas la popolon pekeman.

K:6/146 : Diru : "Mi ne trovas en tio, kio estis revelaciita al mi, iun manĝaĵon malpermesitan por manĝanto, krom ĉia mortintaĵo aŭ verŝita sango aŭ karno porka – fakte tio estas malpura – aŭ profanaĵo, super kiu alia nomo estis alvokita ol tiu de Allah. (...)

K:8/42 : Kaj sciu, ke el ĉio, kion vi akiras en batalo, kvinono apartenas al Allah kaj al la sendito kaj al la parencoj kaj al la orfoj kaj al la malriĉuloj kaj al la vojirantoj (...)

K:9/5 : Kiam estos pasintaj la monatoj malpermesitaj, mortigu la idolanojn, kie ajn vi trovos ilin kaj kaptu ilin kaj kontraŭstaru ilin, embuskante. Se ili tamen pentos kaj levos la preĝon kaj disdonos almozojn, tiam lasu al ili ilian vojon libera. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

K:9/23 : Ho vi, kredantoj ! Ne prenu viajn patrojn kaj fratojn kiel amikojn, se ili preferas la miskredon al la kredo. Kiu el vi tion faras, tiu estas malbonfaranto.

K:9/29 : Batalu kontraŭ tiuj el la popolo de la Skribo, kiuj ne kredas je Allah kaj al la vivo venonta, kaj ne rigardas malpermesita tion, kion Allah kaj Lia sendito malpermesis, kaj ne sekvas la veran religion, ĝis ili donos la tributon libervole kaj humile.

K:9/111 : Vere Allah aĉetis de la kredantoj iliajn animojn kaj iliajn proprajojn per la Paradizo; ili batalas pro la afero de Allah, ili mortigas kaj estas mortigitaj – promeso deviga por Li, en la Torao kaj en la Evangelio kaj en la Korano. Kiu plenumas sian promeson pli bone ol Allah ? Do ĝoju pro via alianco, kiun vi konkludis kun Li. Tio estas la plej granda feliĉo.

K:10/5 : Al Li estos la reveno de vi ĉiuj : vera promeso de Allah. Vere Li estigas la kreon, poste igas ĝin reveni por rekompenci la kredantojn kaj la bonfarantojn, laŭ justeco; kaj por la miskredantoj estos trinkaĵo el bolanta akvo kaj dolora puno, ĉar ili miskredis.

K:10/85 : Moseo diris : "Ho mia popolo ! Kiel vi kredis je Allah, do fidu je Li, se vi estas vere submetiĝintaj".

K:15/10 : Vere, Ni sendis la Admonon kaj Ni certe estos Gardanto super ĝi.

K:16/37 : Ni vere vekis ĉe ĉiu popolo senditon : "Adoru Allahon kaj evitu la malbonon". (...)

K:16/90 : (...) Ni sendis al vi la Libron kiel klarigon de ĉiuj aferoj kaj kiel gvidilon kaj favoron kaj bonan novaĵon por la subletiĝintoj.

K:21/105-106 : En la tago, en kiu Ni kunrulos la ĉielojn kiel kunruliĝas la skribvolvaĵoj. Kiel Ni komencis la unuan kreon, Ni renovigos ĝin. Deviga estas por Ni la promeso : vere Ni plenumos ĝin. Vere Ni jam skribis en la Psalmoj, post la admono, ke Miaj justaj servantoj heredos la landon.

K:22/68 : Al ĉiu popolo Ni donis manierojn de adorado, kiujn ili observas. Do ne disputu pri tiu afero, sed voku vian Sinjoron. Vere vi sekvas la rektan gvidadon.

K:24/3 : Adultulon kaj adultulinon vi skurĝu cent fojojn, kaj ne lasu kompaton malhelpi vin kontraŭ la leĝo de Allah, se vi kredas je Allah kaj al la vivo venonta; iuj kredantoj ĉestu al la puno.

K:31/28-29 : **(28)** Se ĉiuj arboj, kiuj estas sur la tero, estus plumoj, kaj la maro inko, kaj sep oceanoj estus aldonitaj al ĝi, tamen ne elĉerpiĝus la vortoj de Allah. Vere Allah estas ĉiopova, saĝa. **(29)** Via kreo kaj via leviĝo estas por Li kiel tiuj de unu animo. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉiovida.

K:33/22 : Vere en la sendito vi havas belegan ekzemplon por ĉiu, kiu esperas je Allah kaj je la lasta tago kaj ofte memoras Allahon.

K:33/41 : Mahometo ne estas la patro de iu ajn el viaj viroj, sed la sendito de Allah kaj la sigelo de la profetoj; kaj Allah vere scias ĉion [ĉiuj filoj de Mohamedo mortis infanaĝe]

K:33/50 : Ho vi kredantoj ! Kiam vi edziĝis al kredantinoj kaj poste eksedziĝis, antaŭ ol vi tuŝis ilin, tiam ne estu por vi rilate al ili iu limtempo de atendo : tiuokaze do provizu ilin, kaj resendu ilin konvene.

K:42/14 : Li dekretis por vi pri la religio, kion Li jam ordonis al Noa, kaj kion Ni revelaciis al vi, kaj kion Ni konfidis al Abraham kaj al Moseo kaj al Jesuo : ke vi estu persistaj pri la religio kaj ne disiĝu pri ĝi (...)

K:43/62 : Ĝi vere estas vera scio pri la Horo (...)

K:60/5 : Vere vi havas bonegan ekzemplon en Abraham kaj en tiuj, kiuj estis kun li, kiam ili diris al sia popolo : "Ni nenion havas komunan kun vi nek kun tiuj, kiujn vi adoras anstataŭ Allahon. Ni repuŝas vin kaj jen, inter ni kaj vi estiĝis por ĉiam malamikeco kaj malamo, ĝis vi kredos je Allah kaj nur je Li". (...)

K:65/5 : Se vi estas en dubo pri tiuj el viaj virinoj, kiuj ne plu esperas je la monataĵoj, sciu, ke ilia tempo estas tri monatoj kaj same estas por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havas monataĵoj [tro junaj por menstruado].

K:68/5 : kaj vi [Mohamedo] certe posedas eminente noblan animon.

K:75/17-20 : Ne movu vian langon per ĝi [per ĉi-tiu revelacio], por akceli ĝin. Nin vere koncernas la kolekto kaj la legado [koran-ahu], tial, kiam Ni legas ĝin, vi sekvu ties legadon. Poste nin koncernas ĝia klarigo [bajan-ahu].

Bahaa Esperanto-Ligo (B.E.L.)

Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio

T +49-(0)6192-9929-16 F +49-(0)6192-9929-99

< <http://www.bahai.de/bahaaeligo> >

< bahaaeligo@bahai.de >